

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Decembro 2019

(51a jaro)

N-ro 182

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen


Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP

*Bonajn kaj Ĝerenajn
Festo Tagojn!*



Elda



*En la strumpoj
novaj ideoj por Esperanto!*

Albert

James



Karaj Elf-Arek-anoj!

Alia jaro pasis por ni sed ankaŭ por nia ELF-AREK kaj ties ĉi LVL. Alproksimiĝas rapidpaŝe la jarfino kaj nova jaro staros baldaŭ antaŭ ni. ELF-AREK komencis la 2019an jaron per funebra informo, la morto de nia tre kara kaj neanstataŭebla amiko Rudolf Burmeister, kiu foriris de ĉi mondo je la 14a de januaro. Tio estis granda bato por ni ĉiuj, precipe por kiuj estis konsciaj ke lia perdo povus signifi la finon de la Ligo kaj ĉesigo de la eldonado de LVL. En tiaj malfeliĉaj cirkonstancoj mi tre timis, ĉar antaŭ ni ne videblis brila estonteco. Sed okazis - mi diru - ia miraklo, ĉar al mia alvoko, instiganta al daŭrigo de nia vojo eĉ sen la valora kunlaborado de nia Rudy, respondis neatendite pluraj liganoj, kiuj metis sin je dispono por malhelpi la malaperon de nia plurjardeka fak-asocio.

Tutunue danko iru al la redakcia teamo - Albert Boon kaj James Rezende Piton - kiuj tuj alkuris konkrete miahelpe, sed mi neniam forgesos la multajn, kiuj mesaĝe kaj ankaŭ letere kuraĝigis min pluporti la torĉon. Jen mi pretas fari mian plej bonon, sed memoru ke sen VI mi estas kiel Don Kiĥoto luktanta kontraŭ la muelilojn: mi bezonas Vin, ELF-AREK bezonas Vin - nu, antaŭen, persiste kaj insiste, ni ĉiuj kune.

Elda Doerfler

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

La 4an de decembro, mi ricevis la jenan mesaĝon, senditan de malnova germana ELF-AREK-ano.

Karaj s-noj.

Mi estis unu el la unuaj abonantoj de LA VERDA LUPEO. Mi ĉiam ĝojis, kiam ĝi alvenis.

Nun mi estas tro maljuna kaj mi devas ĝin malaboni, eĉ se mi bedaŭras. Mi deziras al vi ĉion bonan, agrablan novjaron.

Harald LURZ

Nia Altestimata Amiko fidele akompanis la iradon de nia Ligo dum 34 jaroj, ĉar li aniĝis en 1985. Nome de ĉiuj ELF-AREK-anoj mi dankas lin pro lia konstanta ĉeesto en niaj vicoj kaj la multjara subtenado de nia filatela agado!

Ni ĉiuj bondeziras al vi pluan serenon paŝadon sur la vivopado kaj filatel-amike Bonan Novan Jaron!

Elda Doerfler

Tigroj kaj Esperanto en Usono, 1912

James REZENDE PITON

Trovi Esperanton sur neatendita kolektindaĵo - speciale bildkartoj - estas mia daŭra plezuro. Pensu nur, ke peceto da kartono restis en fotoskatolo, tirkesto aŭ inter paĝoj de libro dum pluraj jardekoj, konservita en perfekta stato. Tiam ĝi riviĝas al ni, en ruliĝanta 21a jarcento. Ĉu tio ne egalas al tempokapsulo? Des pli se la riviĝo ankaŭ rivelas al ni nekonatan/forgesitan fakton.



Antaŭnelonge unu el tiaj bildkartoj venis al miaj manoj kaj tuta esplorfadeno malfermiĝis. Danke al ĝi, ĉi-kune reproduktita, mi eksciis pri serio de jaraj eventoj en la urbo Takomo - Tacoma (WA) - Usono, ekde 1912.

La simileco al Esperantoradikoj en la titolo *Montamara Festo* ne estis koincido. La revuo *Amerika Esperantisto* (Vol. 11, N. 2, Marto 1912) detale raportis kaj petis diskonigon pri la aranĝo kaj sciigas, ke s-ro Lehman Wendell, Konsilanto de la tiam Esperantista Asocio de Norda Ameriko, gajnis la konkurson per nomo en Esperanto, inter pli ol 1 mil proponoj. La nomo elektita por tiu neesperantista aranĝo estis kun la senco de la *mont-* *to ĝis maro*. Tiujn esperantajn vortojn oni trovas sur poŝtkartoj, afiŝoj, broĉoj kaj pingloj.

La Festo komenciĝis kiel parto de alianco inter la tri konkurantaj urboj Seattle, Tacoma kaj Portland. Tri grandaj eventoj okazis unu post la alia dum la usona somero, inter junio kaj julio. La pinta spektaklo de la festivalo en Tacoma estis aŭtokurado Montamarathon (t.e. *Montamaratono*) ĉar ĝuste en tiu urbo troviĝis unu el la plej bonaj tiamaj aŭtokurejoj en Usono.



Tiamaj ĵurnaloj raportis, ke dek mil homoj ĉeestis en la vespera inaŭ-



guro, kun fajrartaĵoj kaj prihistoria parado. En la unua eldono, kvar kuradoj okazis, kun la longo inter 150 kaj 400 km.

Mia ekzemplero de poŝtkarto estas nur unu el pluraj modeloj de varbaj poŝtkartoj por la unua Montamara Festo. Ĝi havas bildon de muzikfest-

antaj tigroj kun la angla teksto “Ni survojas al Montamara Festo”. Mal-supre, plorantaj tigroj kun la teksto “Tiuĵ ĉi tigroj ne povas iri”, same angle. Sed la ekzemplero estas al mi kara pro alia kialo: ĝin uzis loka esperantisto! M. Howe petas de germana korespondanto ekzempleron de germana ribujo (!) por planti en sia grundo.

Kial *tigroj*, en Nordameriko? Mi trovis, ke la urbo havis basbalan teamon en 1904-1905 kun tiu nomo, “Tacoma Tigers”, do ĝi verŝajne jam estis tradicia simbolo por la urbanoj.

La Montamara Festo okazis inter 1912 kaj 1922 kaj tiam dronis en forgeso. Mi kredas, ke malmultaj usonaj esperantistoj konscias pri tio, ke Esperanto nomis tre popularan aranĝon en nordokcidenta Usono.



Universala Presejo Esperantista
de Esperanto-Propaganda Instituto
Gemeinde LEIPZIG, Lindstr. 25.



La plej bona maniero de disvasti-
gi la Esperanto-movadon, estas
per la Esperanto-Propaganda
Instituto, kiu estas la centro de
la Esperanto-movado en
Germanio.

*Kiuj konas ĉi tiujn
glm-ojn?
Ĉu iu scias ion pri ili?*

Maldekstre: 1910

Dekstre: 1925



EL SENTA, SERBIO



La 28an de junio aperis en la urbo Senta, Vojvodina provinco, Serbio, okaze de la 29aj Verdaĵ Amikaj Tagoj, stampo dediĉita al József Benes (1930-2017). Li apartenis al la hungara minoritato en Jugoslavio. J. Benes vizit-

is gimnazion en Subotica, akiris diplomon en Belarta Akademio en Beogrado (1963). Li estis pentristo, grafikisto, ilustristo. Li ricevis plurajn serbajn kaj hungarajn premiojn.

La ronda stampo mezuras 38 mm. Sur ĝi la bildo de la artisto, je ties dekstro lia subskribo; la nomo de la okazaĵo, VERDAJ AMIKAJ TAGOJ, 24400 SENTA, eldondato 28.06.2019.

VAT okazas jam de 29 jaroj en Senta, ĉiam en junio, zorge de la loka E-grupo kaj temas pri kultura/turisma renkontiĝo, speciale dediĉita al konatiĝo kun eminentaj sentanoj kaj kun la lokaj naturaj kaj urbaj belaĵoj.

Elkoran dankon al Imre Belec pro lia daŭra kunlaborado!

Se iu estas interesata pri ĝi, bonvolu retmesaĝi al mi: volonte mi helpos por akiro de la stampo.



POŝTA STAMPO KAJ POŝTA KARTO



Bjelovara Esperantista Societo, okaze de festado pri la 110a datreveno de Esperanto en Bjelovar, eldonis filatelan poŝtkarton, kaj la 21an de septembro 2019 estis uzita speciala poŝta stampo por forsendo de korespondaĵoj. Tre bela desegnaĵo la stampo, en kiu elstaras la komenclitero de

nia lingvo: sur la “langeto” de la vokalo E sin trovas la numero 110 kaj en ĝi, blank-koloraj, la vortoj: GODINA-JAROJ. Ĉirkaŭe: Esperanto en Bjelovar - 1909-2019.

HAZARDE TROVITAĴJ

Emisiita la 14an de decembro 2002 de *Društvo za esperanto* - Esperanto Societo Marko Nešić en Novi Sad, norda Serbio. En kvadrato rondangula troviĝas stelo kun ene blanka E: je ĝiaj flankoj la jenaj jaroj - 1922 - 2002, nome la 80-jariĝo de la Societo.




Marko Nešić (Novi Sad, 1873-1938) estis komponisto kaj tamburet-ludisto. Li skribis kaj verkis pli ol 200 komponaĵojn. Li estis tre aktiva en labora, socia kaj kultura kampoj kaj precipe sin dediĉis al muziko, aparte pri aranĝado kaj kombinado de Vojvodinaj kantoj. Li prezentiĝis kiel direktoro de tamburorkestro en teatroj de pluraj eŭropaj ĉefurboj. Liaj muzikaĵoj ankoraŭ nuntempe estas tre aprezataj en tuta Serbio.

Ĉirkaŭ 1922, “ĉika” Marko Nešić fariĝis subtenanto de Esperanto kaj fondis Esperanto-Societon en Novi Sad, kune kun Stevan Vidak kaj Arpad Cajzler, titolitan Amika Rondo Esperanto. Fine de 1924, estis starigita Esperantista Laborista Rondo, kiu en 1932 ŝanĝis sian nom-




Poŝtkarto kun foto de Marko NEŠIĆ: plej probable li sidas ĉe tableto kaj estas komponanta unu el siaj famaj muzikaĵoj. Sur paperoj kuŝas tre eta arĉinstrumento.



en signifas tiu “ĉika”? Mi trovis, per la reta tradukilo, la jenan terminon: *tamburino*, sed mi dubas pri ties signifo. Kiu korektas mian eventualan, nevolan, eraron?

La pk estis adresita al Dolfa Bartošik: Tiu ĉi nomo estas tre bone konata de ĉiuj ELF-AREK-anoj, ĉu ne?


Nur por refreŝigi ĉies memorojn, jen eta biografio pri li, prenita el Vikipedio. Li naskiĝis en 1907 en Borŝice u Buchlovic kaj mortis en 1989 en Prago.



Ceĥa esperantisto, laŭprofesie instruisto kaj logopedisto, ŝatokupe filatelisto, (li ricevis 32 premiojn inter distingo kaj medaloj) kaj grafikisto (portreto de Zamenhof, stampoj kaj ekslibrisoj...). Lerninte nian lingvon en 1926, D. Bartošik estis inter la fondintoj de la Slovaka Esperanto-Klubo en Uherské Hradšič kaj poste gvidanto de programoj en la Esperanto-klubo en Prago. Li instruadis Ĉe-metode en Jugoslavio kaj Ne-

on al Laborista Asocio pri Esperanto, aktiva ĝis 1941a j. Bedaŭrinde jam je la 30a de aprilo 1938 li mortis, ĝuste unu tagon antaŭ la 1a de Majo, la Internacia Tago de Laboristaro: okaze de la funebra ceremonio akompanis lin al lia lasta ripozejo multnombraj laboristoj, portantaj plur-egajn florkronojn, kiel lastan saluton de la kamaradoj el diversaj laboristaj organizoj.

Sur la malantaŭo de la pk datita la 27an de julio 1937, aperas lia subskribo: *ĉika* Marko Nešić. Kion tam-



derlando: en ĉi tiu lando li edziĝis kun loka esperantistino.

Sur la pk M. Nešić skribis: “Kara Samideano! Plenan kaj konstantan feliĉon al la geedziĝontoj deziras ĉika Marko Nešić.”

D. Bartošik prelegadis publike eksterlande kaj redaktis filatelan rubrikon en filatelista bulteno. Li postlasis unikan Esperanto-filatelan kolekton, kiun oni povas admiri ĉe la jenaj retejoj:

<http://www.japhila.cz/hof/0394/index0394a.htm>

<http://www.japhila.cz/hof/0395/index0395a.htm>

ESPERANTA FILATELO KAJ LA BABELA TURO

Ĉu jen unika esperanta poŝtmarko?

Albert BOON




Maksimumkarto kun reproduktaĵo de pentraĵo de la famega Petro Breughel la Olda

Temo de ĉi artikolo estas la rareco de esperantaj poŝtmarkoj kun bildo de la famega, ikona Turo de Babelo, laŭ mito el la Malnova Testamento (Genezo II, 1-9). Ĝi estas mondvaste konata kiel nescienca teorio pri la diverseco de la homaj lingvoj.

Ĉu tiu poŝtmarko vere estus unikaĵo, ne nur pro la fakto, ke ĝi estas la ununura esperanta poŝtmarko de Belgio, sed ankaŭ la unua esperanta

poŝtmarko kun bildo de la famega turo?

Ĉiel, je la 7a de junio 1982 jenan specialan poŝtmarkon la t.n. Regio de la Poŝto eldonis okaze de la 67a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno, la metropolo de Flandrio.



K A R A K T E R I Z O J

Temo: artisma stiligita elvokado
de la Babela Turo laŭ
penetraĵo de Breughel

Dezegno: Hugoké (Hugo De
Kempeneer)

Valoro: 12 belgajn frankojn

Formato de la bildo:
35,4 mm x 24,5 mm

Koloro: polikromia

Tekniko: heliogravura

Gravuro (heliocilindra):
Ets. De Schutter

Realigo: Ĝenerala Laborejo de
la Poŝtmarko en Mehle-
no (Mechelen)

Eldonkvanto: 2 500 000
sendantaj: 1 000
“ministraj
folietoj”: *serĉata*

Nombro de preskliŝoj: 2

Aranĝo de la folioj: 30 unuoj
(6x5)

Dentumo: tipo 11½

Papero: polivalenta-fluoreska

Gluo: surbaze de alkohola
polivinilo

Vendo: ekde la 7a de junio en
ĉiuj poŝtejoj de la Regno

Ekzistas tri tipoj de stampoj:

- Antverpeno: busto de Zamenhof
- 1140 Bruselo: esperanta stelo
- 7010 S.H.A.P.E. – Belgio: motivo de la poŝtmarko

La unuataĝaj kovertoj konsistas el:

- Sursilka motivo
- Teksto “unuataĝa koverto” en la franca, la angla kaj la nederlanda


Rimarko: la tri oficialaj lingvoj de Belgio estas laŭ loĝantara laŭorda kvanto: la nederlanda, la franca kaj la germana. Anstataŭ la germanan oni tamen preferis ... la anglan! Kial ne la germanan aŭ Esperanton?





Unuataga koverto

Estas ankaŭ sendantaj ekzempleroj kun surdorsa laŭorda numero:



Krome ekzistas ankaŭ tre raraj kaj specialaj t.n. “ministraj folietoj” kun nigra poŝtmarko sur blanka papero kaj reliefa stam-po en la suba dekstra angulo. Tiuj folietoj, en malgranda eldonkvanto, estas donacitaj al altranguloj de la politika kaj so-cia mondo kaj lastatempe ankaŭ al abonantoj de poŝtmarkaj eldonaĵoj.





75 jaar Esperanto in Antwerpen

In het kader van het 67ste Wereldkongres van Esperanto, gehouden in Antwerpen van 24 tot 31 juli 1982 herdenkt de Antwerpse Esperanto-groep "La Verda Stelo" haar 75-jarig jubileum.

Enkele jaren na het ontstaan van het Esperanto, in 1887 was er in onze stad reeds een belangrijke groep Esperantisten; in 1907 werd de vereniging "La Verda Stelo" opgericht. Sindsdien heeft de jonge vereniging geijverd voor de verspreiding van de wereldtaal en werden talrijke groeperingen in stad en omgeving opgericht.

In 1911 had het 7de Wereldkongres van Esperanto plaats en meer dan 30 landen waren vertegenwoordigd. De ontwerper, Dr. L. Zamenhof, leidde het kongres en verwelkomde vele personaliteiten. Steeds gaf Antwerpen de toon aan in het land en in 1928 werd hier het 20ste Wereldkongres van Esperanto gehouden. Een speciale poststempel met Esperantotekst werd toen gebruikt om de briefwisseling af te stemmen.

Ook op postzegelgebied wordt het Esperanto meer en meer gebruikt: tot op heden verschenen er een 50tal postzegels met Esperantotekst. Onverwacht zijn de filatelisten die dank zij de internationale taal hun hobby onbeperkt kunnen uitbreiden met verzamelaars over de ganse wereld. We zijn verheugd dat de Belgische regering besloten heeft een Esperantopostzegel uit te geven voor dit kongres met als thema de Toren van Babel van de bekende Vlaamse kunstschilder Brueghel de Oude (16de eeuw).



75 jaroj de Esperanto en Antverpeno

Okaze de la 67-a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno, de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1982, la Antverpena Esperanto-grupo "La Verda Stelo" memoras sian 75-an jubileon.

Ekde la jarojn post la ekzisto de Esperanto en 1887 jam troviĝis grava grupo da Esperantistoj: en 1907 fondiĝis la cirkolo "La Verda Stelo". La juna asocio vigle propagandis la mondlingvon kaj starigis multajn grupojn en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo.

En 1911 okazis la 7-a Universala Kongreso kaj ĉeestis alĝintoj el pli ol 30 landoj. La kreinto, Dr. L. Zamenhof ĉeestis la kongreson kaj estis bonvenigita de pluraj aliranguloj. Ĉiam Antverpeno aktivis kaj en 1928 denove okazis la 20-a Universala Kongreso. Speciala poŝtstampaĵo estis uzata por stempoj la korespondantojn.

Ankaŭ en medioj de kolektantoj oni pli kaj pli uzas Esperanton, kaj sennombraj filatelistoj kontaktas pere de ĝi kun la tuta mondo por kreskigi sian kolektaĵon. Ĝis nun aperis pli ol 50 poŝtmarkoj kun Esperanto-teksto kaj estas alloga kolekto. Ni estas fieraj ke por la nuna kongreso la Belga registaro ankaŭ decidis eldoni Esperanto-poŝtmarkon, karitan laŭ la mondkonata pentraĵo de Brueghel: "La Babela Turo" (16-a jarcento).



**Laŭeventa dokumento en A4-formato okaze de la 75 jariĝo
de la Antverpena klubo "La Verda Stelo".**

Koregan dankon al la kunredaktanto Albert Boon pro la tre detala kaj tre interesa historio pri la belga poŝtmarko.

Elda kaj James

GLUMARKOJ

Elda DOERFLER



La bildo de tiu ĉi glumarko jam aperis en la antaŭa LVL, sed mi estis scivolema pri ĝi, tial mi kuraĝis peti prian priskribon al unu el la LKK-anoj por la 105a UK de Esperanto en Montrealo, nome la kasisto Garry EVANS. Malgraŭ siaj gravaj kaj certe pli urgaj laboroj, li tre ĝentile kaj detale kontentigis mian scivolemon. Jen lia respondo:

Ĝi montras skeman vidaĵon de la urbo Montrealo, kun la river-ego Sankt-Laŭrenco antaŭe kaj Monto Royal en la fono. Oni vidas la ponton Jacques-Cartier, la Olimpikan Turon (je la mezo), du katedralojn (unu katolikan kaj unu protestantan), kaj dekstre la plej grandajn modernajn konstruaĵojn de la urbo. Sur la monta pinto estas ne kruco (kiel estas fakte) sed la Esperanto-stelo. Pri la koloroj: la blua estas la koloro de la provinco Kebekio, la ruĝa tiu de Kanado, kaj kompreneble la verda estas la koloro de Esperanto.

Tre interesa klarigo! Tamen, en mi mem pensante, mi min demandis, kio koncernas Montrealon kun la pariza horloĝ- kaj juvel-produktisto *Cartier*? Nu, mi malkaŝas al vi mian senfinan ignorantecon! Vikipedio min helpis kaj fine malkovrigis la vero pri tiu grava persono: Jacques Cartier.

Franca esploristo kaj navigisto (1491-1557), li gvidis tri gravajn ekspediciojn kun la celo malkovri pasejon al Kataĵo (antikva Ĉinio) por eltrovi riĉaĵojn. Dum sia dua vojaĝo li malkovris vilaĝon *Stadacone* (la estontan Kebekon) kaj *Hochelaga* (Montrealon) kun rivero Sankt-Laŭrenco. La indianoj lin akceptis amikiĝeme kaj - laŭŝajne - la ŝipnaro kondukis dece.

Sed la kroniko tie ĉi finiĝas, ĉar ne sufiĉus la tuta LVL por rakonti pri tiu ĉi eksterordinara esploristo. Do, iĝu esploristoj ankaŭ vi, navigante interrete!

Ĉi glumarko incitetis min, ankaŭ danke al puŝeto de la kunredaktanto Albert Boon, kiu antaŭnelonge sendis al mi, virtuale, du glumarkojn, por mi tute nekonatajn, kvankam ili estis eldonitaj en 1932. Ĝis nun neniam mi estis vidinta ilin: ĉu eble ili ambaŭ troviĝas en viaj kolektoj? Mi estas tre fervora glumarkkolektanto kaj tre ĝojus trovi inter



vi aliaj interesiĝantoj pri tiu ĉi temo. Nu, vi rigardu ĉi sube la ricev-itajn glumarkojn.

Antaŭ la fondiĝo de ELF (16.07.1964), kaj poste de AREK (01.10.1968)



kiuj aŭtune 1975 kuniĝis, kompreneble jam estis starigitaj pluraj asocioj okup-iĝintaj pri filatelo, ĝenerale, al kiuj al-doniĝis asocioj de kolektemuloj. Post ilia fondo preskaŭ tuj aperis koncerna organo, kiu estis grava interligilo por la asocioj celantaj interŝanĝadon de plej variaj objektoj (pm-oj, glm-oj, alu-met-etikedoj, stampoj, poŝtkartoj ktp).



Interese estas, ke jam en 1901 ekzistis la

“Internacia Societo de Poŝtkartemuloj”, kies celo estis helpi la pli ol 1200 membrojn *“el kiuj multegaj estis esperantistoj”* akiri ilustritajn poŝtkartojn. Delegito de tiu Societo estis s-ro Léopold Leau, matematikisto kaj lingvisto, membro de S.P.P.E (Societo por propagando de Esperanto), kiu ofertis tiun ĉi servon pensante ke tio estus tre utila por la disvastigado de nia lingvo. Plie, samjare, aperis artikoleto pri “Propagandaj markoj”, en kiu estis skribite, ke ili estas la *“plej bona rimedo de propagando. kiu postulas plej malmulte da mona elspezo ĉar nia esperantista frataro estas tre malriĉa”*. [...] *La propagandaj markoj, algluitaj sur kovritaj leteroj aŭ malkovritaj*, povus esti bona propa-gando por nia lingvo. (Fonto: *Lingvo Internacia*)

En la jaroj 1920-1930-aj aktiviĝis kelkaj aliaj asocioj por kolektantoj, pri kiuj iom mi eksciis, danke al karmemora Jean Amoureux kiu posedis imponan arkivon de gazetoj, revuoj k.a., kies konsultado malfermis pordon al preskaŭ senfunda puto da historiaĵoj ĉi-kampaj. Ekzemple, en 1922 aperis en Budapeŝto, Hungario, asocio kies nomo estis *KO-FI-NU-KO* (*KO*respondo, *FI*latelio, *NU*smatiko, *KO*lektado), Libera Unuiĝo de kolektantoj kaj korespondemuloj esperantistaj. Pa-gante jarabonon, oni ricevis la revuon, ĉiujare aktualigitan membro-karton kaj senpagan anoncon en la organo, dum devoj de la membroj estis kompreneble pagi akurate la kotizon, respondi al ĉiuj kiuj al li skribas, kaj ... persekuti tiujn, kiuj hazarde enŝteliĝus pro kaŝita mal-bonintenco en la anaron por trompi ilin!


En 1925 aperas la Gazeto de la Internacia Esperantista Kolektanto Klubo, Sekcio de Migrantaj Poŝtkartoj, kun titolo *Amikeco* kaj prezi-danto s-ro Josef Groeber, en Coblenz am Rhein.

Tre fervora aktivulo en la kolektemula sektoro, estis József TAKÁCS, esperantisto ekde 1909, hungara dentokuracisto, pioniro de Esperanto kaj redaktoro de pluraj Esperanto-periodaĵoj. En 1930 li fondis TAK, Tutmonda Asocio Kolektanta, kiu je la 1a de januaro 1932 havis jam 140 anojn en 14 landoj kaj ankaŭ



propran

gazeton *Tutmonda Kolektanto*. La celo de TAK estis kunigi ĉiuspeciajn kolektojn, ebligi al ili reciprokajn interŝanĝeblecojn, eduki la anojn per fakartikoloj, defendi iliajn interesojn kaj servi al ili per eldonado de faklibroj; akiri por ili diversajn favorojn kaj servojn, esperantigi la naciajn filatelistajn societojn kaj faggazetojn.



La asocio estis tre serioze engaĝita precipe en la propaganda kampo kaj bone kunlaboris kun siaj filioj diverslandaj. La kolektoĵoj estis la plej diversaj, ekde ekslibrisoj, gazetoj, glumarkoj, insignoj, poŝtkartoj kaj kompreneble poŝtmarkoj. József TAKÁCS kompilis en 1934 la unuan *Poŝtkatalogo-n de Esperantaj porokazaj Glumarkoj*. Tiu ĉi fervora samideano bedaŭrinde estis

mortpafita de hungaraj faŝistoj en oktobro 1944.

El 1930 estas la flanko koverto, kiu atestas pri la ekzisto de la Universala Filatelia Esperanto-Klubo, kun sidejo en Casablanca, Maroko, redaktanta la revuon *La Poŝtmarko*. Nenion alian mi scias pri ĝi.

En tiuj jaroj esperantistoj, ĉiam inventemaj kiam temas pri



malkovro de nova vojo por disvastigi Esperanton, komencas prepari ekspoziciojn pri ... Esperantaĵoj. Dum la 12a Jugoslavia Kongreso de Esperanto en Karlovac - 28-29 majo 1939 - Mehmed JAKUPOVIĆ aranĝis la 2an Glumarkekspozicion. Feliĉe mi konatiĝis kun li: rezulto estis ke li tre komplezeme



min helpis min eniri la mondon de esperantaĵoj.

Sed ni reiru denove iom malantaŭen en la tempo. Jen alia koverto kun surpresaĵo: Tutmonda Unio de Kolektantoj (TUK). La sendinto estis la varsoviano Władysław Lekowski; adresito, s-ino Prost el Lyon, Francio. Dato: 22.11.1933.

Skribis pri li artikolon en *Sennaciulo* - junio 1986 - Zofia Banet-Fornalowa:

En majo 1938 pereis heroe partoprenanto de bataloj por demokrata Hispanio, K-do Władysław Lekowski. Lia partopreno en la bataloj: "por nia kaj via libero" estis konsekvenco de lia arda, ĝismorte fidela, batalo por realigo de socialismaj idealoj.

Laborista E-movado multe ŝuldas al li - unu el ĉefaktivuloj de socialista E-movado en antaŭmilita Pollando. Eldoninto kaj redaktoro de ununura E-Laborista gazeto en Pollando. Fidela adepto de Zamenhof. [...]

[...]Estante fervora filatelisto li eldonas en la jaro 1930 esperantlingve "Adreslibron de filatelistoj", kaj en la sekvanta jaro li fondas "Tutmondan Union de Kolektantoj" (TUK) kaj komencas eldoni esperantan gazeton "La Filatelisto". Dekomence li ne traktas la kolektadon de poŝtmarkoj kiel nuran amuzon, sed kiel unu el la rimedoj por havi internaciajn rilatojn kun eksterlandaj kamaradoj; afero malfacila en kondiĉoj de tiama reĝimo...

Kaj nun ni iru al 1935: aperis januare de tiu jaro la *Verda Revuo*, en kiu estis anon-



cite, ke *jam de 1 ½ jaroj* eblas aboni la monatan bultenon, *Filatelisto Esperantista*, kiu mendeblas ĉe Raul Melo, Drancy, Francujo. Interesa por ni ĉi informo: en 1976 li redaktis, dum unu jaro, *La Verda Lupeo/Fenikso-on*: temis pri nur kelkaj provizoraj numeroj, antaŭ ol trovi anstataŭanton (kiu estos Rudolf Burmeister - jan. 1977) sekve de la eksigo de la ĝis tiam funkcia redaktanto, d-ro Antonio de Salvo.

Inter miaj brokantaĵoj elstaras 5 eldonitaĵoj, aperintaj en la 1940aj jaroj. Tiuj, miaopinie, estas tre valoraj atestiloj pri la ampleksa agado de esperantistoj-filatelistoj.

Laŭdate mi citas ilin:

1) 1946 jan. - 1a N-ro - *The International Bulletin* - LA INTERNACIA BULTENO - Oficiala Organo de la Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj (IAPK). Eldonita en Berks, Anglujo. Dulingva: angla kaj esperanto.

2) 1947 jan.-febr. - N-ro 119 - 19a jaro - LA INTERLIGILO - Oficiala organo de I.L.E.P.T.T. - Internacia Ligo por Esperanto en Poŝto, Telekomuniko kaj Transportoj. Administracio en Parizo; redakcejo en Gulscard, Francujo. La enhavo rilatis al *Katalogo de oficialaj poŝtaĵoj kun esperanta teksto*, zorgita de Georges Saget. La *interligilo* estis fondita en 1922.

3) 1948 mar.-apr. - 2a N-ro - 2a jaro - INTERNACIA POŝTMARKA REVUO. La organo de IAPK ŝanĝis sian nomon. Centra Oficejo: Berks, Anglujo. Enhavo: dulingvaj artikoloj pri poŝtmarkoj, Listo de prifilatelaj periodaĵoj, Historiaj rakontoj. A5-formata, 34-paĝa. La angla-lingvaj tekstoj okupas la unuajn 17 paĝojn; la esperantaj la restantajn 17. Tutegaleca disdivido!!!

IAPK - informoj trovitaj diras, ke ĝi estis fondita en 1946 de P. H. Lewis kaj ke ĝi aniĝis al UEA de 1948 ĝis 1959. La bulteno estis eldonita unue en Anglujo, kaj ekde 1951 ĝi gasti en iu paĝa anguleto de *La Espero*, Svedujo. Ekde 1952 la *Internacia Poŝtmarka Revuo* iĝis memstara.



La dekstra simbolo estis presita sur koverto sendita la 9an de majo 1957.



K
o
v
r
i
l
p
a
g
o
jd
e
l
a
r
e
v
u
o
j



Kaj mi daŭrigu ĉi tre koncizan, malkompletan kaj kompletigendan historion pri kolektado kaj Esperanto.

Antaŭ la fondiĝo de ELF (1964), dum dek jaroj ekzistis EKIK, *Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo*, starigita la 11an de novembro 1953 de Louis Obreczian el Watermann, PA, Usono. La organo de EKIK estis *La Glumark-Kolektanto*. Tiu organizaĵo pereis ĉefe pro neelteneblaj kvereloj, aperintaj ankaŭ en la paĝoj de la EKIK-gazeto; certas tamen ke ĝi sukcesis festi sian dek-jariĝon, nov. 1963, pro la glumarkoj eldonitaj okaze de tiu evento.

En tiuj jaroj glumarkoj invadis nian Esperantujon kaj fariĝis treege malfacile sukcesi kolekti ĉiujn, daŭre eldonatajn, markojn. S-ro Obreczian farigis multegajn: Admiru ĉi sube kelkajn el ili!



*Dekstre: glm-oj mem-
rantaj pri la unua fon-
dodatreveno de EKIK*






Koverta sendita de L. Obreczian al esperantisto de Palermo, Italio. Ne legeblas la dato.



Kvara datreveno de fondiĝo de EKIK 1953-1957



EKIK 10-jariĝo

Kaj fine ni alvenas al nia ELF-AREK, kies unua, kaj ĝis nun lasta, glumarko videblas ĉi-flanke.

Aŭtoris ĝin Herman Menges el Nederlando. Ĝi estis presita en flava, bruneta kaj lazura koloroj. Laŭ tiu bildo grafikisto el Trieste, Eraldo Sepulcri, desegnis poŝtmarkon por nia ligo: ĝi estis mendita en Slovenio septembre 2013. La pm-oj estis donaco de R. Burmeister kaj E. Doerfler al ELF-AREK, por ke ĝi ricevu iom da mono per ilia vendo. Mi informas vin ke ĝi ankoraŭ aceteblas ĉe mi je po 2,00 € plus sendokostoj.

Kvara marko dekstre: Ĉiu Esperanta pm-o, pk-o, poŝtstampo, glm-o estas grava dokumento pri la disvastiĝo de nia kara lingvo. Kolektu ilin! Aliĝu al EKIK fondita 11.11.1953
Prave tion ĉi rekomendis Louis Obreczian





ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com;

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be

